

Estrara interkonsiliĝo la 13-an de oktobro 2016 (per Skajpo)

Partoprenantoj: Mario Machlik, Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde (dum punktoj 0-6), Herman Ranes, Jardar Eggesbø Abrahamsen (dum punktoj 6-8). Dum punkto 5 partoprenis ankaŭ Lu Wunsch-Rolshoven.

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 8-an de septembro

Aprobata post korektado de erareto sub punkto 2.

2. Ekonomio

Skagen Vekst: 49 332 kr (51 751 kr)

Skagen Høyrente: 129 828 kr (129 676 kr)

DNB ofertis al ni senkostan Vipps-"konton". Ĝis nun ni ne sukcesis perrete subskribi la dokumentojn pro teknikaj kialoj. Ne urĝas.

3. Landa kunveno 2017

Herman Ranes proponas, ke ni evitu la periodon 18/6 - 23/6, ĉar tiam okazos la Starmus-festivalo en Trondheim, kaj tio verŝajne interesas plurajn el niaj membroj.

La estraro do decidas proponi la duan semajnfinojn en junio, de 9/6 ĝis 11/6, por nia Landa Kongreso en Sandnes.

Ni invitu Ingebjørg Rambjør verki mallongan tekston por Norvega Esperantisto antaŭ la fino de novembro, kun prezento de la programo kaj kongresejo.

4. Strategia plano, laborplano (vidu retmesaĝon de L. A. Storset la 9/10)

La Landa Kunveno en 2015 difinis la jenan taskon:

"La Landa Kunveno elektis komisionon kiu antaŭ la fino de 2016 prezentu al la estraro proponon de strukturoj de la laborplano kaj la strategia plano.

Membroj en la komisiono: Torstein Kvakland, Judith Parelle Abrahamsen kaj Leif Arne Storset."

La estraro ĵus ricevis la proponon de la komisiono, kaj trovas ĝin bona. Ni proponas prezenti ĝin tia al la Landa Kunveno 2017, kaj se la Landa Kunveno aprobos ĝin, ni lasu al la LK decidi, kiom ofte la nova laborplano devus esti reviziita.

5. Seminario

Kune kun Lu Wunsch-Rolshoven, la estraro testis Skajpo-sesion kie ĉiuj partoprenis per video. Ĝi funkciis perfekte hodiaŭ, kun kvin partoprenantoj.

Ŝajnas, ke la 19a de novembro de 14:00 h ĝis ĉirkaŭ 17:00 h taŭgos pli bone por la plimulto de la estraranoj ol la (antaŭe proponita) 12a de novembro. La dato 19/11 taŭgas ankaŭ por Lu Wunsch-Rolshoven.

Mario Machlik verkos artikolon por Norvega Esperantisto (limdato 14/10), invitante la membrojn partopreni en la seminario.

6. Propono pri komuna, skandinava aranĝo (vidu retmesaĝon de la oficejo la 19/9)

La prezidanto de SEF, Ann-Louise Åkerlund, skribis:

Sveda Esperanto-Federacio kaj Dana Esperanto-Asocio iom diskutis havi komunan kongreson/konferencon en majo 2018. Ĉu estus interese por Norvega Esperantista Ligo partopreni? Ni havas ideon pri konferenco sur la ŝipo inter Kopenhago kaj Oslo. Eble ni povus peti subvencion de iu europa instanco kiam temas pri tri-landa aranĝo.

Ni estas pozitivaj pri tia komuna kunveno, kunlaboro, kvankam malfacile estas garantii, ke iu havos tempon tiam reprezenti NEL. Eble estus praktike se iuj el la estaro de la tri landoj povus skajpe interkonsiliĝi pri la detaloj de la aranĝo. Mario respondos al la retmesaĝo.

7. Kostoj pri izolado de la domo de la oficejo (vidu retmesaĝon de la oficejo la 21/9 kaj poste)

Ni devus peti, ke Douglas Draper sendu al la estraro kaj al la domkomisiono la dokumenton "*Vedtekte for sameie*", kaj ni provos esplori ĉu ni povus iel eviti la pagon de la izolado de la domo. Ni opinias, ke kutime la koston de laboroj, kiuj koncernas pri la tuta domo oni devas dividi inter la loĝantoj, uzantoj de la domo.

8. Eventualaĵoj

8.1. Jardar Eggesbø Abrahamsen aŭgustas la tri lastajn protokolojn de la estraraj interkonsiliĝoj en nia hejmpaĝo.

8.2. UEA alvokis al Ĝenerala Voĉdono pri la Ŝanĝo de la Statuto. Ĝis nun neniu de la ĉeestantaj estraranoj havis tempon profundiĝi en la temo, sed ni instigas ĉiujn membrojn uzi sian rajton voĉdoni.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2125h.

La dato por la venonta interkonsiliĝo: 10/11.